



ESPERANTO

NORMANDA BULTENO

unuigo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 7,62 Eŭroj Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

Après les articles de Pierre Pottier, d'Alain Chalm et de Klaus Schlüter, voici un autre témoignage pour compléter la série:

KIAL KAJ KIEL MI FARIGIS ESPERANTISTO ?

Mi estis 18 jaraĝa kiam mi ekstudis Esperanton.

Mi memoras ke, iam, promenante, mi legis, unuan fojon, la vorton "Esperanto" sur afiŝeto kiu anoncis kunvenon de esperantista klubo: mia patro klarigis al mi ke Esperanto estas universala lingvo.

Aliajn fojon, trarigardante librovendejon, mi vidis libreton: "L'Esperanto en 12 leçons" de Pierre Delaire.. Mi ĝin aĉetis kaj mi trovis plezuron studante la 12 lecionojn; mi estis mirigata pro la simpleco kaj precipe la logikeco de tiu lingvo. (En lernejo, mi studis nur la anglan). Sed la metodo ŝajnis al mi tro simpla kaj ĝi entenis tro malmulte da vortradikoj.

Tio okazis en 1946: mondmilito finiĝis unu jaron antaŭe. Ĉiuj homoj kontentis trovi pacon kaj liberon. Post 6 jaroj de mallumo, ŝvamis ideoj, idealoj, filozofioj nekonataj de gejunuloj. Aperis aŭ reaperis multaj ĵurnaloj, semajnaj kaj monataj gazetoj kaj revuoj. Malgraŭ militviktimoj, malgraŭ detruitaj domoj, malgraŭ manko da nutraĵoj, malgraŭ malbonegaj vivkondiĉoj, grandiĝis granda espero por pli ĝusta socio kaj pli paca mondo!

Post "liberigo", okazis multaj patriotismaj ceremonioj kaj kunvenegoj, sed okazis ankaŭ bedaŭrindaj venĝemaj agoj pri kiuj ni ne fieras nun (ekzemple tondado de haroj de virinoj kiuj amoris kun germanaj soldatoj!). Ofte, patriotismo fariĝis ŝovinismo. Tiam, socialismaj kaj internaciistaj ideoj allogis min; ĉiusemajne, mi legis gazeton de socialista junularo: "Jeunesse". Iam, tiu gazeto komencis aperigi esperantistan rubrikon. Tiu serio de por-esperantaj artikoloj daŭris multajn semajnojn; ĉe la fino de ĉiu artikolo estis la adreso de respondeculo de perkoresponda kurso. Mi decidis aliĝi la kurson kaj mi ricevis studlibron: "Cours rationnel et complet d'Esperanto". Mi regule sendis farendajn taskojn kaj senpacience mi atendis la korektojn kaj klarigojn. Ĉe la fino de la kurso, mi demandis al mia instruanto: "Kiel praktiki Esperanton? Kiujn librojn mi legu por komenci?" Li respondis: Legu la librojn de Eugeno Lanti kaj aliĝu al SAT kaj SAT-Amikaro (Mi, daŭre, estas membro de ambaŭ asocioj) Legado de verkoj de Lanti interesis min pro nekonformismo kaj sennaciecaj ideoj kiuj kontraŭstaris al ŝovinismo.

Mi estis studinta perkoresponde sed en tiu epoko, ekzistis nek diskoj, nek kasedoj. Kiam mi, unuafoje, ĉeestis kunvenon de Esperanto-klubo en Rouen, mi estis timema ĉar mi bone legis Esperanton sed neniam mi estis ĝin aŭskultinta. Fakte, dum la unua horo, vortoj miksiĝis en miajn orelojn malebligante rapidan komprenon. Feliĉe, dank'al bona lernado, la miraklo okazis kaj interparoloj fariĝis por mi kompreneblaj.

En 1948, mi estis 20-jara kaj venis la tempo de deviga soldatservo. Kun plezuro, mi eksciis ke mi militservos en Germanio. Imagu ke en tiu epoko, junuloj ne povis trapasi landlimojn pro politikaj kaj financaj motivoj. Nur armeo ebligis eksterlandajn vojaĝojn! La kazerno kie mi restadis dum unu jaro situis en turisma regiono ne detruita de milito; mi restadis en Lindau / Bodensee (Konstanca lago). Tie, surprize, mi renkontis alian esperantistan soldaton kiu nun estas aktivulo de Norda Federacio (Lucien Giloteaux). Ni kontaktis germanajn samideanojn kiuj proksime loĝis kaj tiel, ni havis okazon konversacii kun alilandanoj. Ofte, mi devis, trajne, veturi inter Lindau kaj Baden Baden: la trajno haltis en Villingen (Nigra Arbaro) kaj mi vidis sur kajo de stacidomo tabulon indikantan adreson de esperantista klubo. Tieajn esperantistojn mi kontaktis kaj vizitis.

Mi aliĝis aliajn asociojn. Mi abonis multajn revuojn. Mi regule korespondis kun diverslandaj esperantistoj. Sen Esperanto, mia vivo estus alia.

Pro la ĝojoj kaj plezuroj kiujn ĝi alportis al mi, mi ne bedaŭras la tempon kaj monon kiun mi dediĉis por nia lingvo.

Petro KIJJO

Nia bulteno regule aperas 4 foje en la jaro.

Mi presigas 130 ekzemplerojn kaj mi sendas 122 el ili al abonantoj kaj al diversaj asocioj.

En Normandio, estas 92 abonantoj :

- 23 en Calvados
- 9 en Eure
- 9 en Manche (+ 1 ezemplero por la grupo de Cherbourg)
- 2 en Orne
- 48 en Seine Maritime

Ekster Normandio, estas 9 abonantoj

Mi sendas senpage, interŝanĝe kaj informcele 22 ekzemplerojn al internaciaj, landaj kaj regionaj asocioj.

De kelkaj jaroj, mi bedaŭrinde konstatas regreson de abonantaro : mi devas streki el la abonlisto tiujn kiuj ne plu kotizas. Kelkfoje, revenas al mi la bulteno pro adresŝanĝo aŭ rifuzo . Tiu regreso ne estas kompensata de novaj membroj.

Ĉu "Normanda Bulteno" interesas legantaron ? Mi ne scias. Pagante abonkotizon, kelkaj afable dankas min sed neniam mi ricevas kritikojn kaj sugestojn. Ĉu la bulteno tedeas legantaron ? Mi plurfoje skribis ke ĝi estas nur ligilo inter samregionanoj. Multaj finlemintoj ne scias kiel uzi la lingvon ĵus akiritan. Ili rifuzas aliĝi internaciajn asociojn. Ili ne deziras aboni literaturajn revuojn kaj ili malaperas konstatinte ke Esperanto neniel utilas. Pro tio, estis kreita Union des Espérantistes de Normandie ĉar la fondintoj de nia unuigo esperis tiel restigi la novulojn.

La artikoloj estas verkitaj, parte de mi, parte de kontribuantoj kiuj sendas al mi sian "prozon". Mi lingve korektas (kvankam ne ĉiam bone) la ricevitajn artikolojn . Dum la jaro deko da membroj kontribuis al verkado.

Ne estas cenzuro kaj mi ne havis okazon rifuzi aperigon de "ĝeniga" teksto. Se tio okazus kion mi devus fari ? Kelkaj opinioj povus okazigi reagojn de alipensantoj. Ĉu tio igus pli vigla kaj pli interesa la bultenon ?

Por ne malkuraĝigi novulojn, mi aperigas franclingvajn tekstojn sed mi tute ne intencas traduki francen la esperantistajn informojn : la lernintoj devas mem progresi por kompreni. Estas malmultaj esperantistoj en nia regiono kaj ne eblas diri ke kvalito superas nombron; mi ja havis okazon konstati ke multaj ne mastrumas la lingvon.

Nun, la bulteno estas la nura aktivaĵo de Esperanto-Normandie. Nia regiono estas vasta : inter Le Tréport kaj Cherbourg, la distanco estas granda. Aktivuloj preferas fari lokan laboron ol regionan. Certe, ĉefa laboro devas esti farata en urbaj kluboj per informado, malfermo de diversnivelaĵoj kursoj, renkontiĝo kun vizitantaj alilandanoj, partoprenado al staĝoj kaj kongresoj.

Bonvolu pripensi pri tio. Viaj opinioj interesos ĉiujn kaj ni havos okazon diskuti pri ili dum la regiona kunveno kiu okazos la 17an kaj 18an de Majo 2003 en Jullouville (inter Granville kaj Le Mont Saint Michel)

La REDAKTANTO : Petro KIJŲ

KAJ NUN LA KASISTO :

Mi atendas vian abonkotizon por la jaro 2003.

La oficiala kotizo estas 7,62 Eŭroj sed mi estus kontenta se vi sendus 8 Eŭrojn: tio faciligus mian laboron.

Kotizo devas esti pagata ĉe komenco de jaro kaj ne ĉe fino Mi tre bedaŭras konstati ke kelkaj ne kotizis por 2002

Pro ĝentileco, mi ne volas skribi la nomojn de nepagintoj

KOTIZOJ -ABONOJ:

.LISTE DES ADHERENTS qui ont réglé leur abonnement 2002:

Gesinjoroj Bachimont, Bataille, Bessière, Boudet, Canu, Caron, Chalm, Colombel, Corrieu, Demmer, Domingo, Dolard, Dubois, Duflo, Dufossé, Dufresne, Esp-Cotentin, Erhard, Evrard, Frelon, Gibaux, Gibert, Gueroult, Guerre, Guilnot, Haulard, Helbert, Huet, Jourdain M.L., Jourdain D., Jouvin, Lamy, Langanay, Lebrun, Lecouvreux, Legros, Leguillon-decosse, Lehericey, Lemarchand, Lemenager, Lévesque, Leroy, Lesueur, Lévy, Loisel, Longuet, Loupiac, Magerel, Marie F., Mary P., Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Paris, Paumier, Pilet, Pottier, Quillaud, Rauch, Robiolle, Rolland, Séry, Tailpied, Tanguy, Turmel, Zilliox

Si votre nom ne figure pas dans la liste ci-dessus, c'est parce que vous avez oublié de régler votre cotisation 2002 ; n'attendez pas pour nous envoyer votre contribution. Adressez nous en même temps les cotisations 2002 et 2003 Epargnez nous de devoir vous rayer de notre liste ou alors prévenez nous que notre bulletin ne vous intéresse pas ! Epargnez au trésorier de fastidieux pointages et rappels

La KASISTO : Petro KIJŲ

COTISATIONS NATIONALES ET INTERNATIONALES

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (UEA):

avec le Jarlibro et l'abonnement à la revue "ESPERANTO": 50 Eŭroj (sans la revue : 20)

Association Mondiale des jeunes espérantophones (TEJO)

avec le Jarlibro et les revues "Kontakto" et "TEJO-Tutmondo" : 20 E pour les moins de 30 ans

Les plus de 30 ans peuvent adhérer comme membre bienfaiteur de TEJO et recevoir les mêmes revues

Cotisation : 60 E

ESPERANTO FRANCE (U.F.E.)

avec la revue "Le Monde de l'Esperanto" et le bulletin "Okazas" : 52 E

sans la revue : 30 E

Il existe des tarifs réduits pour les couples, les étudiants, les chômeurs

ESPERANTO JEUNES (JEFO)

avec les revues "Jeunesperanto-info" et "Koncize" : 30 E

Tarif réduit pour scolaires, étudiants, chômeurs : 15 E

Les cotisations pour ces 4 associations sont à régler à Esperanto-France, 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris
CCP 855 35 D Paris. De préférence demandez à UFE le bulletin d'adhésion ou de renouvellement à joindre à
votre chèque

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT)

avec jarlibro et mensuel "Sennaciulo" et "Sennacieca Revuo" (annuel) : 50 E

Cotisation à régler à SAT Peranto CCP 17333 10 N Paris.

Envoyez votre chèque à Pierre Quillaud 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Gd Quevilly

SAT AMIKARO

avec le bulletin mensuel du même nom : 32 E (jeunes: 16 E)

Cotisation à régler à SAT Amikaro CCP 37 852 90 L La Source

SAT Amikaro 67 avenue Gambetta 75020 Paris

FEDERATION ESPERANTISTE DU TRAVAIL

Cotisation et abonnement à "Le Travailleur Espérantiste" : 19 E (Soutien 36 E)

115 rue Bérenger 92320 Chatillon CCP 902 52 F Paris

ESPERANTO - INFO

Revue d'information sur la langue internationale

(en Français A ne pas confondre avec la revue "Esperanto" d'UEA)

Abonnement simple : 15 E (soutien : 25)

Esperanto-Info Les Bories de Coperlac Mas Saint Chély

48210 Sainte-Enimie CCP 11901 46 B Marseille

LUTTE POUR LES DROITS LINGUISTIQUES

Esperanto France a lancé une campagne en faveur des droits linguistiques.

Nous joignons à Normanda Bulteno un bulletin de soutien.

Ce n'est pas un appel réservé aux porte-monnaie des espérantistes mais surtout à l'intention de ceux qui désirent
une communication internationale et qui se trouvent dans des associations humanitaires, religieuses, politiques ou
autres

Vous êtes déjà sollicités par de nombreuses associations qui se revendent leur fichier. Le mouvement espérantiste
n'a pas les moyens de se payer un fichier et compte donc sur vous pour se faire connaître.

Toute personne effectuant un don bénéficiera d'une déduction fiscale équivalente à la moitié de son don

J'adresserai d'autres bulletins de soutien (pour vos amis, vos connaissances) si vous m'en faites la demande.

Petro KIJO

Amor-arda aŭtomobilo

Iom ĉarma ankoraŭ estis l'aspekto de la ruĝa aŭto : Bone prizorgataj estis ĝiaj pneŭmatikoj kaj karoserio kiun, tamen, strekis kelkaj faltoj. Cetere, eluzita estis ĝia koro : kelkfoje misfunkciis la motoro pro longa uzado kaj multaj malfeliĉaĵoj.

Iu vespere, tiu veturilo malĝoje estis revenanta hejmen. Ĝi pensis ke, kiel kutime, ĝi tutsole tranoktos en sia malvarma kaj preme malluma garaĝo. Subite, en ĝirejo, ĝiaj reflektoroj ekvidis belegan trajnon kiu fiere rapidis tra la nigra nokto.

Malsaĝa espero ! Eĉ, se, bedaŭrinde, ne estis reciproka la fulmobato, pli rapide ekcirkulis la karburado tra vejnoj kaj arterioj ; pli rapide ekbatis la koro sub la kapoto, kvankam iomete singultis la motoro en la brusto !

L'amoraĵo de ĝia vivo devis malakceli pro laboraĵoj apud la fervojo. Atingi ĝin penis l'aŭtomobilo..... Fine, ĝi tuj povos kareseme tuŝi la objekton de siaj deziroj kaj reciproke esti kareseme tuŝata fare de tiu-ĉi, sur traknivela pasejo !

Kiam okazis la tiel dezirata renkonto, de nun fatala, la ruĝa veturilo entute ekflamiĝis : ĝi ja havis eksplod-motoron kaj veran amorardon !!!

Gérard LECARPENTIER
el Carentan (50)

La 11an de Novembro 1918 finiĝis la unua mondmilito. Nur kelkaj dekoj da tiamaj soldatoj ankoraŭ vivas : ĉiuj estas cenjaruloj. En Francio, la 11a de novembro, dato de armistico, estas feria tago, okazo de manifestacioj, ĉe mortintomonumentoj sur kiuj estas gravuritaj la nomoj de soldatoj kiuj vivis en la urbo aŭ en la vilaĝo kaj kiuj pereis dum la masakro. Ankaŭ gravuritaj estas la nomoj de viktimoj de 2a mondmilito sed la listo estas mallonga ĉar, por Francio- milito (kaj malvenko) estis rapida. Dum la unua mondmilito, mortis pluraj milionoj da soldatoj grandparte pro nekompetenteco de generaloj kiuj konsideris soldatojn kiel materialo kondukota al buĉejo. Multaj soldatoj konsciante pri sia neevitebla morto preferis ribeli. Por forigi ribelemon, kelkaj, eĉ senkulpaj kaj tute hazarde estis mortpafitaj "por la ekzemplo"

La redaktoro P.K.

AFERO "MAUPAS"

En la tombejo de Sartilly (50), estas tombo sur kiu estas skribitaj la nomoj de kvar kaporaloj : Maupas, Lefoulon, Lechat kaj Girard.

La milito 14 / 18 estis infera : la koto, la malvarmo, la ratoj, la tranĉeoj, la sango, la kadavroj, la batalo per bajonetoj, ktp... Soldatoj ne plu havis kuraĝon batali kaj rifuzis iri al la sturmo

Militkonsilantaro kondamnis ilin al la morto,, "por la ekzemplo". Por la historio, ili fariĝis : "la mortpafitoj de Souain"

La edzino de Maupas, Blanche, batalis kontraŭ la malhonorigo de sia edzo. Ŝi dediĉis sian tutan vivon al lukto kontraŭ la militista potenco, kontraŭ siaj najbaroj kiuj ne plu volis paroli al edzino de mortpafita soldato.

Ŝi estis instruistino. Imagu ŝian vivon dum tiuj jaroj ! Estis tiel malbone ke ŝi malsaniĝis.

Finfine, ŝi sukcesis rehonorigi sian edzon kaj la aliajn kaporalojn, post multe da tempo kaj ne ankoraŭ oficiale...

Teatraĵo de Sro Alègre estis verkita pri tiu temo kaj estis ludita en oktobro 2002 de bonegaj aktoroj , proksime de Sartilly. La nomo de la teatraĵo estas " La Amo mortpafita".

Estu sciate ke Blanche MAUPAS estis liberpensulino kaj la grupo de libera penso de nia regiono (Manche) nomiĝis Grupo Blanche Maupas por honorigi ŝin.

Mi estas ano de tiu grupo. La 10an de Novembro 2002, mi honorigis tiujn kvar militistojn kiuj kuraĝe batalis sed tamen ne sufiĉe por la superuloj



(Théophile Maupas)

Christian LEVESQUE

LA VIVO DE NIAJ KLUBOJ :

HEROUVILLE (14) :

Komence de novembro, nia klubo akceptis aŭstralan samideanon, Sandor Horvath, dank'al la invito de nia klubano Claude Ferrand. Ili konatiĝis dum UEA kongreso en Israelo. Sandor, hungare devena, faris longan vojaĝon tra Azio kaj Eŭropo kaj kaptis la okazon por kontakti la lokajn Esperanto-klubojn. Li estas instruisto por la aboreginoj. Dum vespera kunveno, li prezentis interesajn lumbildojn pri sia domo. Li loĝas jam de multaj jaroj kun pluraj personoj laŭ, kiel eble plej ekologiaj principoj : ŝparado de energioj, biciklado, interseksa egaleco, ktp... Li skribis en nia orlibro : "... 22 homoj dum malvarma, pluvema vespero. Mi estis ege impresita. La etoso en via klaso estis tre agrabla, afabla kaj studema. Tiu sperto ankaŭ kuraĝigis min pli disvatigi nian belan lingvon en mia nuna lando Aŭstralio".

"A 66 ans, je parcours le monde à vélo" Jen la titolo de franclingva prelego de Zef Jeguard organizita la 29an de Novembro en Maison des associations de Hérouville Saint Clair :

Zef Jeguard, 67 jara, estas eksterordinara biciklisto. En 2000, li iris de Bretonio al la lago Bajkal en Siberio. En 2001, de Pakistano ĝis Vladivostok, tra Ĉinio, Mongolio kaj denove Siberio. En 2002, li trairis Kanadion. Dum siaj vojaĝoj, li uzas biciklon (60 kg !) kaj esperanton. Pro tio, ni invitis lin prelegi. Ĉeestis preskaŭ 60 personoj, plej multaj ne esperantistaj. Ĉiuj interesatoj de biciklado kaj aventuro. Zef prezentis tre belajn lumbildojn per altnivela cederom-muntaĵo. Li humure kaj lerte komentis ĝin. Homoj metis multajn demandojn, dum vespero agrabla, atentoplena, bonetosa. Zef verkis samnivelan libron "Papy fait le tour du monde" pri sia ekspedicio en Azio, kiu tre bone vendiĝis dum tiu publika vespero. Li estis intervjuita de Radio Bleue Basse-Normandie, kaj Ouest-

France bone raportis.

Legu lian libron (21 eŭroj), kaj invitu lin por publike prelegi, vi travivos agrablan momenton kaj tre efike reklamos por Esperanto !

Yves NICOLAS

CHERBOURG

La grupo precipe konsistas el fervojistoj.

Ekzistas elementa kaj perfektiga kursoj

LE HAVRE

La kunvenoj estas monataj. Kursoj estas organizitaj

GRAND - QUEVILLY

Samideanoj kunvenas por faldi, enkovertigi kaj sendi Normandan Bultenon; ne estas kurso; la klubo ne plu estas fako de laika amikaro

ĈE PARTNERAJ GEAMIKOJ EL SAKSIO : EMAS (Esperanto en Malsupra Saksio) Regiono de Hanovro :

Sabaton 22a de Septembro, okazis la EMAS Kulturtago en Hanovro, Domo de Naturamikoj. Partoprenis 25 personoj el Malsupra Saksio kaj najbaraj regionoj.

La nuna Prezidanto estas Hans Fechler. Venontjare okazos novelekto de estraro.

Oni akceptis novan statuton kun teksto kiu permesas al ni ke ni estu "de publika utilo", (Gemeinnützigkeit) (asocio kiu estas "de publika utilo" mem ne pagas impostojn, kaj personoj kiuj pagas al ili kotizojn aŭ donacojn, ricevas rabaton sur siaj pagendaj impostoj)

Post la komuna tagmanĝo, ni aŭdis interesan kaj amuzan prelegon pri la serioza temo "Pri la sanecaj danĝeroj de vojaĝoj al malproksimaj regionoj". Parolis la veterinaro Prof. d-ro Rüdiger Sachs kiu pasigis profesiajn 30 jarojn en Afriko kaj poste estis sciencisto en la Instituto por Tropikaj Malsanoj en Hamburgo. Liaj rekomendoj por eviti tiajn danĝerojn, la ĝustaj vakcinoj, kaj daŭra evito de trinkaĵoj kiuj ne estas servataj en fermitaj boteloj. Ankaŭ salatoj kaj nekuiritaj fruktoj estas danĝeraj.

Malgranda parto de la partoprenantaro fermis la tagon per vizito al la fama "Pluv-arbara domo" en Hannover-Herrenhausen (La "Pluvarbara Domo" estas botanika muzeo kun alta, vitra salono, en kiu oni imitas la atmosferon de la pluvarbaro. Tie kreskas la originalaj arboj kaj aliaj plantoj; ankaŭ troviĝas kelkaj bestoj, ekz. papilioj

Komunikis : Klaus SCHLUETER

ESPERANTO NORMANDIE

DEZIRAS AL SIAJ LEGANTOJ KAJ MEMBROJ

AGRABLAJN FINJARAJN FESTOJN

ĜOJAN KRISTNASKON

MULTAN FELIĈON DUM JARO 2003

ATENTU KAJ BONE MEMORU TIUN DATON :

Sabate 17an kaj Dimanĉe 18an de Majo 2003

Rezervigu tiun daton sur via kalendaro !

Tiu dato estas tiu de nia regiona renkontiĝo : Ĉiuj normandaj esperantistoj estas invitataj ĝin partopreni en Jullouville (50) inter Granville kaj Mont Saint Michel

L'Assemblée Générale de notre association se tiendra dans les locaux d'une colonie de vacances de la ville de Saint Ouen. Les gîtes sont de 2, 3, ou 4 places. A titre indicatif, la pension complète (nuitée + petit déjeuner, + déjeuner + dîner) coûterait entre 30 et 33 euros. Possibilité d'arriver le vendredi.

En dehors des discussions, la partie récréative pourrait comprendre une marche dans la baie du Mt St Michel un diaporama de Zef' (voir dans ce bulletin le compte-rendu du club d'Hérouville), des rencontres avec les espérantistes bretons.

Un programme plus précis vous informera dans Normanda Bulteno qui vous parviendra début mars. Cependant pour que cette manifestation puisse avoir lieu, il est indispensable que vous donniez dès maintenant votre accord de principe à l'organisateur, notre ami Christian Levesque qui se charge de l'organisation etnotamment de la réservation des gîtes.

En conséquence, réservez sur vos agendas les dates des 17 et 18 Mai 2003

Informez de votre désir de participer et contactez pour tous renseignements :

Christian Levesque 456 Route des Epinettes, 50740 Saint Michel des Loups Tél. 02 33 91 75 08

KULTURO DE NEPERFORTO KAJ PACO

La asocio "Étincelle" (fajrero) cirkuligas peticion en rilato kun la decido de U.N. proklami la jarojn 2001-2010 "Jardekon de la Kulturo de la neperforto kaj de la paco" :

"La Ĝenerala Asembleo invitas la ŝtatojn membrojn fari disponon por ke la praktiko de la neperforto kaj de la paco estu instruataj ĉiunivele de iliaj respektivaj socioj, inkluzive en la instruejoj."

Tiucele diversaj asocioj redaktis peticion sendotan interrete au perpoŝte al la ministro de Edukado LucFerry por instigi la eduksistemon rapide :

- integri en la instruado de la instruistoj la interrilatan dimension de ilia profesio (pritraktado de la konfliktoj, animado de grupoj, pritaksado de la laboro sen estigi senton pri malplivalorigo por la lernanto, ktp);
- integri en la enhavo de la instruoj por la lernantoj jam de la infanlernejo la disvolvon de interrilataj kompetentecoj (lerni memfidon sen agresi aliulon, kapabli auskulti, eĉ se oni ne konsentas, kunligi vortojn kun la emocioj, trovi solvojn kiuj malavantaĝas nenium, ktp).

La peticletero esta ricevebla de Véronique Guérin, autorino de "A quoi sert l'autorité ? s'affirmer, respecter, coopérer" (Al kio utilas aŭtoritateco ? Manifestiĝi, respekti, kunlabori". Véronique Guérin <asso.etincelle@free.fr>

Ni povas samokaze montri, diskonigante tiun peticion, ke, jam en 1913, jam pli frue ol Gandhi kaj liaj instruoj pri neperforto, D-ro Zamenhof skribis, inter multe da aliaj tekstoj :

"Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj, sed ne laŭ lia deveno. Ĉian ofendadon au persekutadon de homo por tio, ke li naskiĝis de alia gento, kun alia lingvo au religio ol mi, mi rigardas kiel barbarecon." (Homaranismo, 2, 1913).

Laŭ komuniko de Henri MASSON